

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2019. №10



Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2019. №10 (300)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas nur elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Paweł Fischer-Kotowski (vicredaktoro), Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Povilas Jegorovas, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajevo, Sergio Pokrovskij

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

Retejoj: <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

Perantoj. Vidu la liston sur p. 68-69.

Abontarifo por 2019

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Pollando: 60 zlotoj

Ruslando kaj Belarusio: 850 ruslandaj rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represo: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2019, №10 (300).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 5 октября 2019 г.

| | |
|--|-----------|
| Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i> | 2 |
| En ĉi tiu numero | 3 |
| Temo | 5 |
| Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. La lasta jubileo de <i>La Ondo</i> | 6 |
| Probal Dasgupta. Mi levas glason..... | 6 |
| Eventoj | 7 |
| Peter Baláž. La dua LingvaFest' en Slovakio..... | 8 |
| Renato Corsetti. Italoj kongresis kaj rezoluciis | 10 |
| Yves Nevelsteen. Beneluxa Kongreso | 12 |
| Ilja Gnusarjov. La 35a Arkones | 14 |
| Ilona Koutny. Interlingvistika sesio kun instruista trejnado en UAM..... | 15 |
| Henryk Kosicki. Esperanto sur la strando | 17 |
| Bert Schumann. Ĉu infanoj partoprenis en UK?..... | 18 |
| Orlando E. Raola, Said Baluĉi. Malferma Tago | 19 |
| Povilas Jegorovas. Celebrado en Veisiejai | 20 |
| Povilas Jegorovas. Zamenhof migras tra Litovio | 21 |
| Miroslav Malovec. Svitavy: Nova ekspozicio en la Esperanto-muzeo..... | 22 |
| Miroslava Kosnarová, Lenka Angelová. Pardubice: Triobla datreveno | 23 |
| Carlos Maria. Esperanto en Tagvatingo | 23 |
| Libuše Dvořáková. Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo..... | 24 |
| UEA invitas prelegi en Montrealo | 24 |
| Irina Gonĉarova. Ukraino prelegvojaĝis en Ruslando | 25 |
| Transponta kongreso 2020 | 26 |
| Koncize (7 informoj)..... | 27 |
| Elstaraj agantoj de UEA..... | 27 |
| Arkivo | 28 |
| Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en oktobro 2019 | 29 |
| Pavel Birjukov. Vojaĝo al la nuna Rusio | 30 |
| Paŭlo Medem. Pri vojaĝo al nuna Rusio | 35 |
| Lingvo | 38 |
| Věra Barandovská-Frank. IALA kaj Interlingua | 39 |

| | |
|---|-----------|
| Kulturo | 52 |
| Sten Johansson. Ne eblas aplaŭdi unumane. Ĉapitro 1 | 53 |
| Vjaĉeslav "Slavik" Ivanov. <i>Aliroj al Esperanto</i> estas mirinda libro (Recenzo: <i>Aliroj al Esperanto</i>)..... | 60 |
| Anne Jausions. Vortoj, kiuj faras nian lingvon malfacila (Recenzo: Wierzbowski P. <i>Konfuziloj</i>) | 61 |
| Halina Gorecka. <i>Beletra Almanako</i> , 2019, №34 | 62 |
| <i>Literatura Foiro</i> , 2019, №300 | 64 |
| Ricevitaj gazetoj | 64 |
| Biblioteka Apogo Bachrich atendas subvencipetojn | 65 |
| Mozaiko | 66 |
| István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj..... | 67 |
| Kiel aboni <i>La Ondon</i> | 68 |

Sur la kovropaĝo estas momento el la tradicia kukurbofesto, kiu ĉiuoktobre okazas en la apudkaliningrada banurbo Zelenogradsk. Je ĉi tiu kukurbotago en la verda urbo (Зеленоградск = Verda Urbo) dominas koloroj oranĝaj kaj oraj, sed ne mankas ankaŭ aliaj foire buntaj koloroj, kiuj agrable variigas la aŭtunan pejzaĝon. Venu foje al nia Sukcena Lando ne nur por somera plaĝumado, sed ankaŭ por aŭtuna promenado. (Foto: Halina Gorecka)

Ni en la reto:

La Ondo de Esperanto: <http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>

Abono 2019: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Elŝuteblaj libroj: <http://esperanto-ondo.ru/Librojl/Librojl.php>

Novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>


Radio Esperanto: <http://radio.esperanto-ondo.ru/>

Halina en FB: <https://www.facebook.com/halina.gorecka.3>

Aleksander en LJ (ruse): <http://sezonoj.livejournal.com/>

Ruslingva informretejo: <http://rusa.esperanto-ondo.ru/>

Temo



En la sekva paĝo vi lernos, ke ĉi tiu numero de *La Ondo* estas ne nur jubilea, sed ankaŭ *antaŭantaŭlasta*. Sed eĉ post la lasta ni restos en Esperantujo kun niaj retejoj, podkastoĵ, verkoj, tradukoj, prelegoj kaj, sendube, kun niaj libroj. Cetere, ĉu en via biblioteko jam estas BLK kaj NDK? (Ni ripetas la somerfinan foton, faritan de Aleksej Korĵenkov)

La lasta jubileo de *La Ondo*

La oktobra kajero de *La Ondo de Esperanto* estas jubilea – la tricenta ekde la (re) lanĉo de ĉi tiu gazeto en majo 1991. Sed la jubileo havas iom amaran kromguston, ĉar ĝi estos la lasta jubileo de *La Ondo*, kiu aperos nur ĝis la fino de la nuna jaro.

Ni estas devigitaj fari ĉi tiun decidon ĉefe pro la malprogresanta vidkapablo de la redaktoro, kiu apenaŭ kapablas plu laboregi antaŭ la komputila ekrano ĉiutage po 18 horoj (ekde la 9a matene ĝis la 3a nokte) dum la redaktado de *La Ondo*; li devas laŭeble rapide redukti sian labortagon por konservi la reston de sia vido.

Pro ĉi tiu decido, publike anoncita la 21an de septembro en Poznano kadre de la 35a ARKONES, ni devis rekonsideri la eldonplanon de la gazeto por enmeti en la lastan numeron la tekstojn, kiuj kutime aperas en la januara kaj februara numeroj: ronda tablo pri la atingoj kaj fiaskoj dum la pasinta jaro, anonco pri la elekto de la Esperantisto de la Jaro, kaj la statistiko pri la eldonado en 2019.

La novembra *Ondo* (№301) aperos la 25an de novembro.

La decembra *Ondo* (№302) aperos la 30an de decembro.

Kompreneble, la baldaŭa ĉeso de *La Ondo* ne signifas, ke ni forlasos Esperanton. Ni plu okupiĝos pri la libroeldonado, reta informado, podkastado, verkado, tradukado, recenzado, esplorado, prelegado, bibliografiado k. a.

Al ĉiuj aŭtoroj, abonantoj kaj perantoj ni direktas nian koran dankon pro ilia helpo!

Halina Gorecka, eldonanto

Aleksander Korĵenkov, redaktoro

MI LEVAS GLASON

Mi provas laŭeble eviti diri ion pri miaj personaj sieĝiĝoj. Tamen necesas fari escepton. Estante persono kun retino degeneranta jam de 1992, funkcia en lando kun nefidinda poŝta servo kaj alirmanko al librabundaj bibliotekoj, kaj baraktanta kun diversfrontaj defecitoj, mi konas konkrete iujn parametrojn kiuj sieĝas amikon Aleksandro – iuj el ili sieĝas lin jam de jardekoj. Mi scias precize, kiom kostas al persono en niaj situacioj entute ion kontribui al Esperantujo. Se malgraŭ tio Aleksandro kaj Halina liveradis la periodaĵon *La Ondo de Esperanto* ekde 1991, kaj multegon alian sur pinta nivelo, kaj se nun Aleksandro pro la plimalboniĝo de sia vido decidas haltigi tiun flankon de sia ĉiutago, ni povas simple bondeziri al li, ke li havu la emon plu kontribui same diligente kaj altegkvalite sur tiuj terenoj malpli riskaj por lia bonfarto...

El institucia vidpunkto ni ĉiuj kompreneble malĝojas pri la sorto de tiu ĉi periodaĵo kies ĉeesto grave muldis la pejzaĝon de Esperantujo de post la finiĝo de la malvarma milito. Miajn sentojn pri tiu aspekto tamen superfortas la persona dankemo al Aleksandro kaj al Halina.

Mi levas glason al tiu paro.

Probal Dasgupta

Eventoj



Ne ĉiu landa aŭ internacia kongreso esperantista enhavas la programeron “Dancu kun ni sub la steloj!”, sed ĝi ja okazis kadre de la 86a Itala Kongreso de Esperanto, organizita fine de aŭgusto en Triesto.

La dua LingvaFest' en Slovakio

Vere granda, sukcesa, bunta aranĝo, dediĉita al lingvoj kaj kulturoj – tia estas lingva festivalo “LingvaFest’”, kiu okazis la 26-27an de septembro en Bratislavo, Slovakio. Ĝi allogis ĉirkaŭ 2500 partoprenantojn, okazis entute 107 programeroj, prezentiĝis 30 ekspoziciantoj. Kaj grava informo: ĝi estas organizita de Esperantistoj!

LingvaFest' havis premieron pasintjare. Sub la gvido de E@I, kunlabore kun EUBA (Ekonomia Universitato de Bratislava) kaj SKEF (Slovakia Esperanta Federacio) ĝi ripetiĝis ankaŭ ĉi-jare – kun eĉ pli granda sukceso (la kvanto de vizitantoj preskaŭ duobliĝis). E@I jam havas riĉan sperton pri organizado de diversaj internaciaj aranĝoj (13 SESoj, 3 Polyglot Gathering, 1 UK...), tial iel nature naskiĝis la ideo okazigi en Slovakio la unuan lingvan festivalon.

Nia ĉefa celo estis promocii multlingvecon, prezenti la riĉecon de la mondaj lingvoj kaj kulturoj kaj diskutigi homojn pri lingvaj temoj, defioj, problemoj. Aldone ja ni sukcesis prezenti diversajn lingvometodojn, aplikaĵojn, lernolibrojn por pli efika lingvo-lernado. Kaj certe “flanka” celo estis videbligi Esperanton! Esperanto ja estis tre bone reprezentita en la festivalo – kompreneble, ĉar esperantistoj mem organizas la festivalon, ili ja povas signife influ i ĝian enhavon. Funkciis Esperanto-budo (apud la ĉefa informejo), apud ĝi troviĝis vendejo de *Espero* kaj KAVA-PECH. Kaj kompreneble okazis rapid-kurso de Esperanto, eĉ trifoje. Ankaŭ la retejo de la festivalo havas Esperanto-version: www.lingvafest.sk/eo

Nia ĉefa partnero estis Reprezentejo de la Eŭropa Komisiono en Slovakio, kiu malavare finance subtenis la festivalon kaj mem havis sian budon en ĝi. Tial ni estas ege kontentaj kaj ĝojaj, ke ĝuste tiu ĉi institucio subtenis la aranĝon – ĝi ja estas la plej alta ebla instanco, kiun ni povus imagi kiel partneron por ĉi-speca aranĝo.

Pro la celo de LingvaFest' ĝi estas planata ĉirkaŭ la “Eŭropa tago de lingvo”, kiu okazas ĉiujare la 26an de septembro. Tial ni ankaŭ okazigas lingvo-politikan diskuton; ĉi-jare temis pri “Lingva hegemonio – ĉu estas ŝanco ŝanĝi ĝin?”, kiu traktis la temon de la aktuala anglalingva dominado, sed parolis ankaŭ pri historiaj kaj diverstipaj nunaj lingvaj subpremadoj.

La festivalon gastigis la Ekonomia Universitato de Bratislava. Ĝia programo (entute 107 eroj!) estis dividita je kvar ĉefaj partoj: prelegoj, uzinoj (kreivaj meti-ejoj), rapidkursoj, kultura programo (koncertoj). Aldone pretis 30 ekspoziciantoj – multaj vere bone prepariĝis, kaj eblis, ekzemple, gajni librolegilon aŭ trisemajnan lingvo-kurson en Hispanio.

Ĝi estas demonstra versio de la 69-paĝa oktobra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La 35a Arkones

ARtaj KONfrontoj en ESperanto ĉi-jare pasis la 20-22an de septembro, do kiel kutime fine de la unua aŭtuna monato. Kaj kiel kutime en la ĉarma okcident-polanda urbo Poznano. Mi ŝatas la urbon en tiu ĉi tempo. Estas agrable varme, kaj por mi estas granda plezuro promeni tra la urbo, lante kaj lace rigardante la lokan arkitekturon.

Por mi, kiu estas studento de la Interlingvistikaj studoj en Poznano, Arkones estas bona loko por malstreĉiĝi post la sesia semajno, dum kiu mi havas ekzamenojn kaj multajn lecionojn. La etoso de la aranĝo ĉiam estas varma, paroliga, vigla kaj samtempe trankvila. Vi havas diversajn eblojn por pasigi tempon dum la aranĝo. En la malnova kulturdomo estas multaj lokoj, kie homoj povas grupiĝi kaj interbabili, trinkante teon, kafon, bieron. Laŭ via plaĉo vi povas elekti tian malrapidan babiladon inter samideanoj aŭ vi povas iri al iu prelego, kiuj kutime abundas. Sed ĉi-jare, laŭ mia opinio, kvanto de la prelegoj iom ŝrumpis.

Kiel ĉiam estis bona vespera programo kun koncertoj de Saša Pilipoviĉ, Anjo Amika, Zuzanna Kornicka, ĴeLe kaj aliaj. Varme pasis la Miela Vespero – tradicia festa vespero dum Arkones. Funkciis libroservo; bedaŭrinde por mi, ĝi ne havas multe da bonaj libroj, tamen mi sukcesis aĉeti kelkajn interesaĵojn, ekzemple, la

Ilja Gnusarjov ricevas la enciklopedion NDK; apude staras Russ Williams kaj Aleksander Korjenkov. (Foto: Halina Gorecka)



novan eldonon de la senmorta epopeo de Adam Mickiewicz *Sinjoro Tadeo* en la senmorta traduko de Antoni Grabowski.

Ĉi-foje mi estis partoprenanto de kelkaj interesaj programeroj. Mi vizitis prezentadon de la nova *Baza Literatura Krestomatio*. La prezentadon gvidis Aleksander Korĵenkov kaj Halina Gorecka, kiuj rakontis pri “granda biblioteko en unu volumo”. Por mi la libro estas aparte interesa, ĉar mi kiel studanto de Esperanta literaturo nepre devas konatiĝi kun la plej ĉefaj verkoj en la lingvo Internacia.

Post la prezentado okazis literatura kvizo, kiun ankaŭ gvidis Aleksander Korĵenkov kaj Halina Gorecka kun helpo de Russ Williams. Aleksander voĉlegis unuajn strofojn de perloj de Esperantaj poemoj kaj unuajn frazojn el originala kaj tradukita prozo, kaj la partoprenantoj provis kiel eble plej rapide rekoni la legatan fragmenton, levi la manon kaj diri la nomon de la aŭtoro kaj, se estas necese, ankaŭ la nomon de la tradukinto. En la konkurso gajnis la aŭtoro de tiu ĉi artikolo, kio ebligis al mi ricevi la libron *Nia diligenta kolegaro*, kiun nun mi diligente legas. Dankon al Aleksander kaj Halina.

Min impresis prelego de mia profesoro Ilona Koutny “De lingvoplano de Zamenhof ĝis nature disvolviĝanta lingvo”, dum kiu ŝi skize prezentis la evoluon de la lingvo. Menciindas prelego de Giorgio Silfer “1993-2020: ĉu fermita periodo en la historio de la esperanta literaturo?”, kie li montris diversajn periodojn de nia literaturo kaj de la lingva situacio en la mondo. Pro la aĉeto de *Sinjoro Tadeo* mi vizitis prelegon de Zbigniew Kornicki “*Sinjoro Tadeo*, ĉu plue aktuala?”, kie li rakontis historion de la Esperantaj eldonoj de la libro kaj starigis demandon: multaj homoj aĉetas la libron, sed ĉu ili vere legas ĝin? Ĉu la verko de Mickiewicz nun estas same aktuala kaj leginda? Mi pensas, ke jes. Certe por ni, esperantistoj, ja la traduko de Grabowski forte influis la Esperantan poezion kaj la lingvon mem. Por havi pli detalan imagon pri la programo venu al la retejo de Arkones. Kaj venu la sekvan jaron, por ĝui la aranĝon kaj konatiĝi kun mi kaj aliaj interesaj homoj.

Ilja Gnusarjov

Interlingvistika sesio kun instruista trejnado en UAM

La sepa grupo de interlingvistikaj studentoj atingis sian trian studjaron en la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando). Dek partoprenantoj el naŭ landoj (Francio, Ruslando, Brazilo, Germanio, Usono, Suda Koreio, Ĉinio, Hispanio kaj Pollando) povis specialiĝi pri instruado aŭ komunikado dum la sesio, okazinta la 14-20an de septembro. Ĝin gvidis Ilona Koutny kun temoj pri internacia kaj interkultura komunikado, instigante diskutojn en la grupo. Kontribuis al la programo Barbara Pietrzak pri ĵurnalismo kaj radiofonio; Roman Dobrzyński pri filmarto ankaŭ kun propraj filmoj el sia longa kariero prezentantaj Esperantan kulturon; Nicolau Dols (ES) pri transmeto de literaturaj tekstoj kaj Ida Stria pri internaciaj helplingvoj.

Al la instruista trejnado aliĝis aldone 12 partoprenantoj el kvin landoj (Meksiko, Italio, Francio, Danlando kaj Pollando), inter ili tri meksikanoj donis novan koloron al la kursaro. La specialiĝon gvidis Katalin Kováts kiu traktis intense kaj interese vastan gamon de instruado ekde diversaj instrumentoj ĝis instruplanoj, prezentis diversajn instruilojn kaj ekzercis la partoprenantojn. Ilona Koutny skizis metodikon, kiel instrui fonetikon, leksikon kaj gramatikon, elstarigante kelkajn problemajn flankojn de esperanto, emfazante la instruadon en laŭtemaj kuntekstoj per komunikada metodo, eluzante ankaŭ siajn temvortaretojn. Por la instruista grupo Aleksander Korĵenkov prezentis la historion de la Esperanto-movado.

La kurso pri nuntempa Esperanta literaturo de István Ertl donis interesan kaj aktualan enrigardon en la temon por ĉiuj partoprenantoj. Estis ebleco prezenti en la literatura kurso la pliampleksigitan kvaran eldonon de *Baza Literatura Krestomatio* kuneldonitan ĉi-jare de *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio.

La komuna vespero merkrede donis eblecon al la gestudentoj prezenti sian kulturon: brazilajn kaj polajn kantojn, ritman meksikan muzikon, poemojn kaj anekdotojn. La sesion kompletigis la semajnfina programo de la kultura festivalo Arkones kun kelkaj aldonaj prelegoj, muziko (i.a., Ĝoja el Ĉinio, partoprenantino de IS, prezentis te-ceremonion).

Ilona Koutny

Ilona Koutny antaŭ studentoj de ambaŭ grupoj (Foto: Edukado.net)





Esperanto sur la strando

Jam la sepan fojon Triurba Esperantista Asocio organizis la internacian renkontiĝon “Esperanto sur la strando”, dum kiu ĝiaj partoprenantoj admiris la ĉarmoĵojn de Triurbo (Gdansko, Sopoto kaj Gdinio) kaj de la ĉirkaŭaĵo.

Kadre de la inaŭguro la 13an de septembro prezentitaj estis kaŝubaj kaj koĉevaj tradicioj. Sur multaj lumbildoj kunvenintoj povis admiri tradiciajn popolajn instrumentojn, ceramikaĵojn, lignajn figuretojn, flartabakujajn kaj survitrajn bildojn. Ili povis vidi, kiel en la diversaj lokoj de Kaŝubio ŝanĝiĝadis brodado kaj kiamaniere oni sukcesis rekrei la tradiciajn vestaĵojn kaj kufojn, kiuj malaperis en la dua duono de la 19a jarcento. Fine de la inaŭguro Maria Hopkins (la edzino de la sube menciita Paŭlo), naskiĝinta en Kaŝubio, rakontis la kaŝuban legendon. Posttagmeze okazis la urba ludo “Gdansko – multkultura vizaĝo de la urbo”. La sekvan tagon en Sopoto ni partoprenis la paradon de Neregistaraj Organizaĵoj. Post la parado d-ro Paŭlo Hopkins, lingvisto el Kanado, kies sciencaj interesiĝoj koncernas la lingvojn de minoritatoj, prelegis pri la kaŝuba lingvo kaj pri la literaturo de tiu ĉi regiono.

Ĝi estas demonstra versio de la 69-paĝa oktobra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Arkivo



Ĉi-foje en nia malofta rubriko “Antaŭ cent jaroj” ni proponas du artikolojn el la revuo *Esperanto* pri la situacio en Ruslando dum la interna milito kaj blokado. Tiam milionoj da ruslandanoj en plenŝtopitaj trajnoj serĉis rifuĝon en pli pacaj kaj pli sataj regionoj. (Foto de nekonata aŭtoro, 1919)

Jubileoj kaj memordatoj en oktobro 2019

5. Antaŭ 135 jaroj naskiĝis **Georges Warnier** (1884-1903-1953), franca komercisto k e-isto; fondinto de Librejo de Eo (1906) k Domo de Eo (kun E. Archdeacon, 1928), prezidanto de la landa asocio UEF (1948-50), sekretario de la 10a UK (Parizo, 1914), prezidanto de LKK de la 24a k 35a UK (Parizo, 1932 k 1950); aŭtoro de kelkaj lerniloj, ofta partoprenanto de la E-kabaredo *Tri koboldoj*.

13. Antaŭ 95 jaroj naskiĝis **Ignat Florian Bociort** (1924-1969-2015), rumana lingvisto k e-isto; fondinto k gvidanto de la kolektivo “Eo kaj interlingvistiko” ĉe Akademio pri Sociaj k Politikaj Sciencoj de Rumanio (1978-89); enkondukinto de Eo kiel nedeviga studobjekto en la filologiajn fakultatojn de Rumanio (1978), la unua prezidanto de la landa asocio EAR (1990), aŭtoro de kelkaj E-lerniloj; honora membro de UEA (1998). — Legu pli en NDK, p. 37-38.

14. Antaŭ 40 jaroj mortis **Milda Jakubcová** (fraŭline: Pirksts, 1899-1924-1979), latva oficistino k e-istino, post la edziniĝo kun F. Jakubec (1932) loĝinta en Ĉeĥoslovakio, E-instruistino k poetino (*Elektitaj versaĵoj*, 1969; *Estrado de animaloj*, 1970), tradukinta al Eo beletraĵojn el la latva, rusa, ĉeĥa k slovakaj lingvoj.

26. Antaŭ 15 jaroj mortis **Chen Yuan** (1918-1931-2004), ĉina lingvisto, redaktoro, ŝtaticisto (vicprezidanto de Ŝtata Skriblingva Reformkomisiono, vicprezidanto de Ĉina Eldonista Asocio, direktoro de Instituto pri Aplika Lingvistiko ĉe la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj, vicministro en Ŝtata Komisiono pri Lingvaj Aferoj) k e-isto; redaktoro de la dum militaj E-gazetoj *Informilo el Ĉinio*, *Justeco*, *Al Nova Etapo*, kunfondinto (1951) k ĝenerala sekretario de ĈEL antaŭ la Kultura Revolucio; vicprezidanto (1980-89), prezidanto (1989-95) k honora prezidanto (1995) de ĈEL, redaktoro de pluraj E-eldonaĵoj, vicprezidanto de LKK de la 71a UK (Pekino, 1986); membro de la Honora Patrona Komitato de UEA (1986). — Legu pli en NDK, p. 58-59.

26. Antaŭ 55 jaroj mortis **Rudolf Hromada** (1890-1907-1964), ĉeĥa bankoficisto k e-isto; membro de Internacia Centra Komitato de E-Movado (1922-30), redaktoro de *Ĉeĥoslovaka Gazeto*, *La Progreso* k *Esperantista*, aŭtoro de kelkaj E-vortaroj, tradukinto de centoj da poemoj (parto de ili aperis en la antologio *Intima Triptiko*, 1978) k *Riporto skribita en la pendumila maŝo* (1979) de Julius Fučík; membro de Lingva Komitato (1921-48) k Akademio de Eo (1948-62); honora membro de UEA (1933).

31. Antaŭ 110 jaroj naskiĝis **Ludwig Schödl** (1909-1928-1997), germana metisto, instruisto k e-isto; aktivulo de la intermilita laborista E-movado (SAT, GLEA, IPE), pledanto por restarigo de E-movado en GDR, kunfondinto (1965) k vicprezidanto (1977-81) de Centra Laborrondo Esperanto ĉe Kulturligo de GDR, vicprezidanto de GDREA (1981); aŭtoro de la unua E-lernolibro en GDR (1967).

Aleksander Korjenkov

Vojaĝo al la nuna Rusio

Amiko de nia movado, S-ro P. Birjukov, parenco kaj biogrado de Leo Tolstoj, bonvolis sendi al ni pri sia lasta vojaĝo al Rusio la jenajn mallongajn notojn, kiuj kelke kontrastas kun la informoj kutime aperantaj en la okcidentaj gazetoj. Ni publikigas ilin dokumente, opiniante, ke ili interesos niajn legantojn, kaj ne prenante respondecon pri la enhavo. (*Esperanto*, 1919, №7)



Pavel Birjukov

Kvar jaroj de la militigo forrabis al mi mian naskolandon. Mi ne ĉesis ami ĝin; ĝia sorto zorgigis min, tragediaj kaj solenaj okazintaĵoj, kies scenejo ĝi estis, altiris miajn esperojn al ĝi, elvokante en mi ardan deziron partopreni je la renoviĝo de la lando. Post vanaj klopodoj por havigi al mi permeson trapasi la landlimojn de la militantaj ŝtatoj, mi petis permeson veturi en la vagonaro, rehejmigonta Rusojn, restintajn en Svisio. La komisiono de la Rusa Ruĝa Kruco proponis al mi la rolon de vagonarestro. Mi akceptis tiun ĉi taskon kun danko kaj kun la konscio de la prirespondeco.

Ni faris vojaĝon malrapidan kaj penplenan, kun ĉiuspecaj surprizaĵoj, kaŭzitaj de la revolucio en Germanio kaj la rompo de ĝiaj diplomataj rilatoj kun Rusio. Fine, Germana vagonaro, konsistanta el nehejtaj komercaĵ-vagonoj, veturigis nin ĝis la landlimo de la sovjeta Rusio kaj forlasis nin sub nura ĉiela ŝirmo kun malsanuloj, infanoj, virinoj kaj multege da pakaĵoj.

Mi estis devigata tramarŝi dudekon da kilometroj por atingi stacion de Rusa fervojo, kie mi povus havigi vagonaron por miaj kunvojaĝantoj restintaj sur senkovra landlima kampo. Do mi eniris la novan Rusion piede, dumnokte, en nekonata regiono. Mi devas konfesi, ke mi marŝadis kun sento de plena konfido, kaj ĝi ne trompis min.

Trairinte kelkajn kilometrojn, mi renkontis antaŭpostenon de la ruĝa armeo. Ĝi estis du junuloj, vestitaj grizpalte, kun felĉapoj surkape kaj pafiloj ĉe dorse, kun vizaĝoj senbarbaj, junmienaj, simpatiaj. Ili haltigis min, kriante: “Kiu venas?” – Mi montris mian mandaton de vagonarestro, kaj ili lasis min pasi libere. Mi daŭrigis marŝi en dezerto, renkontante preskaŭ nenan domon kaj irante laŭ la relvojo. Kune kun mi marŝis grupoj de Rusaj militkaptitoj, liberigitaj de la Aŭstria estraro. Ĝi estis la avangardoj de la homtorentego, alveninta kelkajn tagojn post tiu ĉi nokto.

* * *

Mi eniris Rusion kun sento sufiĉe konfuza, timplena. Mi estis leginta tiom da neĝustaĵoj, intencaj aŭ ne, pri la nuna stato de Rusio! Tia legitaĵo tre malhelpis havigi ĝustan ideon pri tio, kio okazas en Rusio. Mi sciis tamen, ke intensa vivo sentiĝas

pli kaj pli en la lando, ruinigita de la cara reĝimo, de la milito, de la revolucio, kaj spite ĉion, vivanta, plena de krefortoj.

Legante tiom da teruraj informoj, mi suspektis grandan troigon kaj eĉ mensogemon. Estis malfacile kontroli la komunikojn. Sed la Tolstoja movado estis sfero de la Rusa vivo, bone konata de mi. Kaj jen ĉiuj ĵurnaloj publikigis novaĵon pri la rabdetruo de Jasnaja Polana, familia bieno de L. Tolstoj. Ĝi estis impresa novaĵo, pruvanta kompletan senmoraligiĝon de la Rusa popolo kaj ĝiaj gvidantoj; la prikomentarioj ne mankis. Post kelkaj semajnoj mi ricevis Rusan gazeton, kie iama sekretario de L. Tolstoj plene malkonfirmis tiun ĉi novaĵon, dirante, ke li vizitis la bienon de L. Tolstoj kaj propraokule konvinkigis pri la falseco de la informo. Mi publikigis tiun ĉi refuton en unu el la ĉiutagaj gazetoj de romanda Svisio; kelkajn semajnojn post tio, alia gazeto ree publikigis la novaĵon pri la disrabo de Jasnaja Polana, kun ankoraŭ pli sensacia aldono pri tio, ke la tombo mem de Tolstoj estis detruita, lia korpo elprenita, forrabita, k. c. Mi ne povis kontroli tiun ĉi lastan novaĵon, sed mi neniel kredis je ĝi. Mi havis ankoraŭ kelkajn dokumentojn, montrantajn ĝis kia grado mankas la veremo en la rakontoj de gazetoj.

Plie, mi konatiĝis kun multaj dekretoj de la nova registaro. Tiuj ĉi dekretoj ŝajnis al mi verkitaj laŭ spirito logika kaj humane demokrata – sendube, por la profito de la laboristaro. Mi vidis difinitan planon, kiun oni intencis plenumi por la komuna bono. Oni povis diskuti pri ĝi, opozi al ĝi, sed oni ne rajtis nomi ĝin raba. Ĉio ĉi stimulis min vojaĝi Rusion, por vidi, ĉu mi povus kunlabori je la konstruado de nova vivo en tiu ĉi lando.

* * *

Mi eniris Rusion je tre malfacila momento: centmiloj da Rusaj militkaptitoj subite plenigis la apudliman regionon. Kontraktinte la militĉeson, la Aŭtria estraro malŝlosis la pordegojn de la militkaptitejoj kaj liberigis la Rusajn kaptitojn tutare. Superplenaj vagonaroj venigis ilin al la Rusa landlimo po multaj miloj per unu fojo, kaj foriris, por tuj venigi ankoraŭ multajn milojn. Tiu ĉi arego da homoj, suferantaj pro malsato kaj nesufiĉa vestaĵo, kun menso preskaŭ freneza pro longa kaptiteco kaj hejmevo, forgesis ĉiujn malfeliĉojn pro la granda ĝojo revidi siajn familiojn.

Nia tendaro troviĝis ĉe la vojo mem, sur kiu paŝadis tiu ĉi homtorento. Ĝi estis katastrofo, naskita de la milito. Sur la bolŝevistan registaron falis la tasko plibonigi tiun ĉi situacion. Mi povis konstati, kiom da energio, intelekto kaj bonvolo ĝi uzis por mildigi la teruraĵojn de tiu ĉi katastrofo, pri kiu ĝi ne estis kulpa.

Ĝi estas demonstra versio de la 69-paĝa oktobra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Lingvo



Danke al malavara financado, IALA ĝuis kunlaboron de konataj sciencistoj (Otto Jespersen, André Martinet, William Edward Collinson, Edward Sapir, Pierre Bovet k. m. a.) kaj de aŭtoroj/adeptoj de kelkaj planlingvoj. Post pluraj lingvistikaj esploroj, lernejoj eksperimentoj, konferencoj kaj eldonaĵoj estis kolektive kreita Interlingua. Konatiĝu kun ĝia historio en la sekvaj 13 paĝoj.

IALA kaj Interlingua

Ni publikigas la komencon de la 13a ĉapitro el la (espereble, baldaŭ aperonta) universitata lernolibro *Interlingvistiko – enkonduko en la sciencan pri planlingvoj* de Věra Barandovská-Frank, verkita surbaze de la kurso, kiun ŝi instruas en la Interlingvistikaj Studoj ĉe la universitato Adam Mickiewicz en Poznano.



13.1. Fondo kaj starigo de programo

Komence de la 20a jarcento, apud la jam funkcia Esperanto, ekestis aro da lingvoprojektoj kun latinida bazo. Pri la problemaro de internaciaj lingvoj ekinteresiĝis pluraj sciencaj organizaĵoj. American Philosophical Society (Usona Filozofia Societo, fondita en 1743 en Filadelfio) estis jam en 1887 stariginta komitaton por ekzameni la sciencan valoron de Volapük, sciante nenion pri Esperanto. Ĝi malrekomendis Volapükon kaj proponis principojn, sur kiuj baziĝu internacia lingvo. Ili devintus esti pritraktataj en internacia kongreso, kiu tamen ne okazis pro nesufiĉa intereso de klerulaj societoj en la mondo. (Estas interese, ke Zamenhof intencis tie diskutigi Esperanton kaj decidigi pri ĝia formo.) Lingva komisiono de American Philosophical Society starigis postulojn por kreado de internacia lingvo surbaze de arĵaj lingvoj, kun latina fonetika ortografio, kun internaciaj vortradikoj, kun facilaj gramatiko kaj prononco.

Gravecon de internacia lingvo agnoskis International Research Council, fondita en 1919 en Bruselo kiel unu el posteulaj organizaĵoj de Internacia Asocio de Akademioj – ĝuste tiu, kiu estis rifuzinta okupiĝi pri internacia lingvo en 1907 (vd. ĉap. 10). British Association for the Advancement of Science (Brita Asocio por Antaŭenigo de Scienco), fondita en 1831 en Londono, diskutis la temaron de internacia lingvo en 1921, kaj kelkaj aliaj similaj organizaĵoj montris intereson pri internacia komunikado ĝenerale.

En tiu favora situacio ekestis komence de la 1920aj jaroj la internacia interlingvistika organizaĵo International Auxiliary Language Association (IALA). Ideo krei internacian lingvistan organizaĵon, kiu kompetente pritraktus ekskluzive problemojn de la internacia kompreniĝo, ekestis en la laborgrupo de profesoro Wilhelm Ostwald (1853-1932) en la universitato de Lepsiko jam ĉ. la jaro 1902 (vd. ĉap. 10 pri lia engaĝiĝo por Ido).

La decida persono en la fondo kaj laboro de IALA estis Alice Morris.

Alice Vanderbilt Shepard Morris (1874-1950) patrinflanke devenis de la entreprenista familio Vanderbilt, unu el la plej riĉaj kaj influhavaj en Usono. Sekve de akcidento en infanaĝo, Alice suferis pro skoliozo, tial ŝi pasigis multe da tempo

sur la sofo, legante kaj studante. Ŝi studis literaturon en la Harvarda Universitato. Kontraŭ la volo de sia patro, eminenta bankisto, ŝi edziniĝis en 1895 al diplomato Dave Hennen Morris (1872-1944), kun kiu ŝi poste loĝis en Bruselo en 1933-1937, kiam li estis ambasadoro en Belgio kaj Luksemburgio. (Li subtenis ŝian agadon per perado de internaciaj kontaktoj kaj estis trezoristo de IALA ekde la fondo en 1924 ĝis sia morto.) La intereson de Alice Morris pri internaciaj lingvoj vekis broŝuro pri Esperanto, kiun ŝi legis dum unu el siaj restadoj en la kliniko. Ŝi ellernis Esperanton kaj financis sciencajn laborojn en ĝi, i.a. la *Bibliografion de Internacia Lingvo* de Petro Stojan (1884-1961) en 1929. Ŝi ankaŭ iĝis membro de Academia pro Interlingua, gvidata de Giuseppe Peano, kiu okupiĝis pri pluraj projektoj de la internacia lingvo. En la diskutojn pri starigo de tia optimuma lingvo estis enplektia ankaŭ amiko de la familio Morris, Frederick Gardner Cottrell (1877-1948), profesoro pri kemio kaj disĉiplo de Wilhelm Ostwald. Ĝuste Cottrell sugestis al Alice Morris serĉi la eblan idealan internacian lingvon helpe de serioza organizaĵo de sciencistoj. Fakte, nur ŝia granda materia helpo ebligis vastan profesion scienc-esploran laboron de IALA. Pro sia engaĝiĝo por internacia kompreniĝo ŝi ricevis en 1931 honoran doktorecon de la Universitato de Sirakuso (Syracuse en la ŝtato Novjorkio).



Alice Vanderbilt Morris

La programskizo de IALA estis prezentita en oktobro 1924. Ĝi ekestis surbaze de kunlaboro de Otto Jespersen (1860-1943, vd. ĉap. 11), William Edward Collinson (1889-1969, profesoro pri la germana lingvo en la Universitato de Liverpolo, esperantisto) kaj Edward Sapir (1884-1939, lingvisto-antropologo en la Universitato de Ĉikago, kunaŭtoro de la Sapir-Whorf hipotezo, diranta, ke la lingvo influas la pensmanieron). La diskutoj ĝis tiam faritaj en sciencaj organizaĵoj gvidis al konkludo, ke neniu el modernaj naciaj lingvoj taŭgus por internacia komunikado, ĉar naciaj lingvoj estas ligitaj al siaj popoloj, la elektita lingvo do privilegias la koncernan nacion.


IALA unue proponis akcepton aŭ modifon de iu el la ekzistantaj internaciaj lingvoj inkluzive de la latina, eventuale ties rekonstruon sur scienca bazo. Por la akceptota lingvo oni uzis terminon “sinteza”, t. e. sisteme konstruita precipe el elementoj de lingvoj klasikaj kaj modernaj. Ekzemple, se oni adoptus la latinan, ĝi estus sinteza en la senco, ke ĝia vortaro devus esti kompletigita per necesaj novaj esprimoj.

Ĝi estas demonstra versio de la 69-paĝa oktobra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kulturo



Bonega novaĵo: baldaŭ en Novjorko aperos nova originala romano de la sveda verkisto Sten Johansson. Ĝia titolo estas *Ne eblas aplaŭdi unumane*. Ni proponas al vi frandi la unuan ĉapitron, kiun Sten afable disponigis por la jubilea numero de *La Ondo*.

Ne eblas aplaŭdi unumane

Ni publikigas la unuan ĉapitron el nova romano de Sten Johansson, kiu baldaŭ aperos ĉe la eldonejo *Mondial* en Novjorko.

Ĉapitro 1. Forlasinte la arkon, sago neniam revenos

Kvarope ni suriris la kajon ĉe trako 3 en la centra stacidomo. Paĉjo insistis anhelante porti unu el miaj valizoj, dum mi mem trenis post mi la alian. Ankoraŭ videblis neniuj trajno.

“Ĉu vi maltrafis ĝin?” diris Panjo, ŝajne kun grajno da espero en la voĉo.

“Tute ne. Restas preskaŭ dek minutoj.”

“Ĝi certe malfruas”, diris Nahid svedlingve.

Kaj efektive. Tuj la laŭtparoliloj ekeĥis: *La rapida trajno kvincent kvardek du de Kopenhago al Stokholmo kun laŭhorara ekira tempo dekkvina nul kvar alvenos je la dekkvina dudek. La malfruiĝon kaŭzis semafora paneo.*

“Kaj kio do kaŭzis la semaforan paneon?” replikis Nahid.

La laŭtparoliloj tamen nenion informis pri tio. Anstataŭe Paĉjo ŝajnis preta elbuŝigi iun el siaj ĉiamaj persaj proverboj, do mi atendis ion pri sago kiu ne revenos al la arko, aŭ eble pri kamelido kiu perdiĝos en dezerto, sed evidente li trovis neniun trafan. Jen vere escepta okazo!

“Ĉi tio ŝajnas omeno”, li svage diris. “Ĉu vi vere certas pri la afero? Ja ekzistas bonegaj lernejoj ankaŭ ĉi tie, ĉu ne? Ne necesas iri al Stokholmo.”

Kompreneble li ne diris “Stokholmo” sed “Estogholmo”, sed tion mi ne atentis. Jam kiel infano mi kelkfoje devis helpi la gepatrojn pri iuj svedaj vortoj, sed ilian akĉenton mi rimarkis nur kiel adoleskulo, kiam unu el miaj amikoj ridante provis imiti mian patron. Nu, mi donis al tiu amiko baton al la kapo pro lia rido, sed poste mi dum kelkaj jaroj tre hontis pri Panjo kaj Paĉjo, ĉar ili ne sukcesis forlasi sian misakĉenton. Nun mi delonge sciis ke al plenkreskulo simple ne eblas akiri perfektan prononcon de nova lingvo, dum al infano tio okazas aŭtomate kaj senpene.

Ĉiuokaze mi ne trovis forton respondi. Ni jam milfoje tradraŝis la temon de mia onta studloko.

“Adaptiĝu, Paĉjo”, mialoke respondis Nahid, ĉi-foje perse por ne senutile inciti lin. “Ĉi-lande oni klopodas sendependiĝi. Neniu plu vegetas eterne ĉe la gepatroj!”

Mi sciis ke ŝi pledas pli multe por si mem ol por mi. Post du jaroj ŝi devos plenumi la saman batalon, kaj estante knabino, ŝi sendube alfrontos pli malfacilan taskon. Aŭ eble ne, ĉar se diri la veron, ŝi estis la partizano de la familio. Mi mem bezonis unu jaron post la abituro por tondi la umbilikan ŝnuron. Jaron, dum kiu mi laboretis,

aŭ pli ĝuste laboregis, kvankam nur dum la limigitaj horoj, kiam oni bezonis min en McDonald's. Mian ĉefan atenton mi dediĉis ne al tiu pangajnado sed al la komputiko, kaj nun mi finfine ekstudos ĝin en la plej prestiĝa loko, la Reĝa Teknika Altlernejo en Stokholmo. Nahid sendube ne bezonos tian kvarantenon, kiam ŝi abituros post du jaroj. Se mi bone konis ŝin – kaj ĉu mi ne konus la propran fratineton? – ŝi havos la necesan studateston por ekstudi kion ajn ŝi volas. Ĉi-momente tio estis medicino, sed mi ne surpriziĝus se ŝia plano en du jaroj plene ŝanĝiĝus.

La atendado jam tedis min, kiam la trajno el Kopenhago finfine alveturis sur la trako kaj bremsiĝis antaŭ ni kun grincado kaj fetoro. Mi kaptis ambaŭ valizojn, malhelpis al Paĉjo eniri la vagonon post mi kaj kapsignis adiaŭe al Nahid, kiu hipokrite ŝajnis tute ne zorgi pri mia foriro. Dume Panjo elsputadis admonojn sen fino.

“Aŭskultu Mehdi, komprenu ke en la altlernejo necesos mem studi tre skrupule, neniu alia zorgos pri vi, kaj ne eblos festadi, tiam vi ne prosperos, kaj ne spitu mian fraton, memoru ke li raportos al mi kiel vi kondutos, kaj evitu la najbarojn, ĉar li diras ke estas amaso da droguloj kaj krimuloj en la kvartalo, sed ne eblas trovi pli bonan loĝejon, kaj revenu hejmen dum semajnfino almenaŭ ĉiumonate, ni pagos la bileton, kaj...”

La vagonpordo aŭtomate fermiĝis, kaj mi vidis malklare tra la fenestro ke ŝi plu parolas. Paĉjo levis la manon, sed Nahid jam turnis la dorson al la trajno.

Komence mi loĝos ĉe onklo Parviz kaj lia familio en la antaŭurbo Alby. De tie eblos iri per metroa trajno al la altlernejo, sed mi jam guglis ke la veturo daŭros tri kvaronhorojn, kion mi trovis ĝene longa. Mi ja kutimis bicikli, kien ajn mi iris. Sed trovi propran loĝejon en Stokholmo estis utopio por ĉiu ajn, kaj kompreneble des pli por malriĉa studento el la fora Skanio.

Mi do komencis miajn studojn en la sveda ĉefurbo, dum hejme en Malmö tuj apud la maro oni inaŭguris la nubskrapulon *Turning Torso*, la plej altan loĝdomegon de Nordio, kaj fore en Ameriko la uragano Katrina atakis sudan Usonon kaj inundis Nov-Orleanon. Mi antaŭvidis ke la studado postulos grandan fortostreĉon, sed mi efektive ne havis gravan problemon pri ĝi. La fama studenta vivo sendube estis vigla, sed ĝi ŝajne okazis plejparte en la urbocentro kaj en la universitata ĉirkaŭaĵo, norde de la centro. Mi male loĝis ĉe la geonkloj, fore sudokcidente, kaj la vojaĝado tien-reen lacigis min eĉ pli ol la studado.

Ĝi estas demonstra versio de la 69-paĝa oktobra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Aliroj al Esperanto estas mirinda libro

Aliroj al Esperanto / Red. Christer Kiselman, Renato Corsetti, Probal Dasgupta; Antaŭpar. Christer Kiselman. – Dobřichovice: KAVA-PECH, 2018. – 229 p.

Aliroj al Esperanto estas mirinda libro, nepre havinda en biblioteko de ĉiu esperantisto, kolektiva verko de kelkaj eminentaj esperantistoj.

Javier Alcalde aŭtoris skizon de la historio de pacmovado kaj la provon aljuĝi pacpremion Nobel al Zamenhof, Detlev Blanke superrigardis interlingvistikon ĝenerale, Cyril Brosch prezentis juran aliron al la Fundamento kaj la Bulonja deklario, Probal Dasgupta tuŝis komplikan temon de Esperanta sintakso, Sabine Fiedler rakontis pri frazeologio de nia lingvo (kaj ĝia graveco por instruado), Federico Gobbo trovis la nepre havendajn gramatikajn trajtojn por ĉiu homa lingvo kaj komparis Esperanton al kelkaj (eĉ ekstereŭropaj) lingvoj, Kimura Goro Christoph esploris la internan ideon de Esperanto kaj la disputojn ĉirkaŭ ĝi, Ilona Koutny montris la lokon de Esperanto en tipologia sistemo de lingvoj, Liu Haitao mezuris Esperanton kaj montris ĝiajn distribuajn kurbojn (kiuj ne aspektas tre nenature surfone de similaj kurboj por aliaj lingvoj), Carlo Minnaja rememorigis pri (o)nia nescio de la Esperanta literaturo, Hirosh Nagata kunlabore kun Renato Corsetti esploris la influon de la gepatra lingvo al la preferata vortordo de E-parolantoj, Orlando E. Raola rakontis pri esperantismo vidpunkte de hedonismo, Giorgio Silfer analizis du leterojn de Zamenhof por konkludi ke “raŭmismo indikas la respondon”, kaj Humphrey Tonkin rakontis pri historiografio de Esperanto, ĝiaj misoj kaj mankoj.

Kelkaj temoj estas tute novaj por mi, kiel la skizo pri la pacmovado, aliajn mi pli frue jam esploris (ekzemple, la statistikan distribuon de Esperantaj vortoj — sed mi menciis, ke Liu Haitao tre bone klarigas la malfacilan temon). La kontribuoj de Gobbo kaj Koutny estis la plej atentokaptaj por mi (kadre de mia intereso al lingvistiko kaj lingva diverseco), sed certe ĉiu leganto trovos sian preferatan aŭtoron kaj povos daŭrigi legadon de la respektivaj verkoj.

La antaŭparolo enhavas aludon al skandalo en la Akademio, pri kiu mi pli frue ne sciis kaj ne scias plu ion krom la aludo kaj duvorta citaĵo (“kadavra veneno”, tiel nomas sin en citiloj akademiano Kiselman). Mi preferus aŭ legi pri tio alineon aŭ tute neniom — por ne pripensi interalie, ĉu ĉiuj aŭtoroj sukcesis konfirmi sian partoprenon en la libro de nova statuso aŭ iu verkis por ĝi kiel por projekto de la Akademio.

Mi rekomendas la libron al ĉiu esperantisto kun profunda intereso al la lingvo kaj ĝia historio, al ĉiu, kiu foje demandas sin: kio igas Esperanton speciala inter la aliaj planlingvoj kaj homaj lingvoj ĝenerale. Mi esperas, ke la dua eldono, se ĝi iam okazos, unuecigos la kontribuojn (kelkaj havas resumon antaŭ la teksto — aliaj ne, la titoloj de kelkaj parolas por si mem — de la aliaj restas enigmo ĝis eklego).



Fine de ĉiu kontribuo estas listo por pli profunda legado kaj biografieto de la aŭtoro. Tiel eblas iom pli proksime “konatiĝi” kun la aŭtoroj, inter kiuj multaj estas tre videblaj aktivuloj en la movado.

Vjaĉeslav “Slavik” Ivanov

Vortoj, kiuj faras nian lingvon malfacila

Wierzbowski, Przemysław. *Konfuziloj: Vortoj, kiuj faras nian lingvon malfacila*. – [Partizánske]: Espero, 2017. – 152 p.

KONFUZILOJ? Pri kio eblas konfuzi? La subtitolo klarigas: vortoj, kiuj faras nian lingvon malfacila.

Fakte temas pri paroj aŭ trioj, malofte kvaroj da vortoj pri kiu signifo aŭ uzo eblas erari. Ekzemple: *astro*, *astero*, *asterio*, *asterisko*. Ĉiuj estas klarigitaj per belaj desegnoj kaj difinoj bazitaj ĉefe sur nia *Plena Ilustrita Vortaro*.

Dedukteblas, ke la malfacilaĵoj koncernas parolantojn el tre diversaj naskiĝlingvoj ĉar retroveblas multe da vortoj prezentitaj en la ludo “Risko” ĉe edukado.net:


- *Pizo, pico, piceo*.
- *Polvo, pulvo, pulvoro, pudro*.

Kompreneble la elekto ne povas esti kompleta, sed ĝi estas trafa, tamen mi dubas ĉu iu povas misuzi la vortojn akcidento kaj okcidento.

La verkisto rekonas ŝuldon al Marinko Ĝivoje, kies *Esperantonimoj* estas fakte orminejo, kaj li kolektis malfacilaĵojn siajn kaj tiujn de interesitaj korespondantoj.

La prezento estas perfekta (tiklis min nur “arda dezio” por pasio), bela, bindita per spiralaĵo, la duobla kovrilpaĝo prezentas la majstron en nekutima maniero.

Jen tre utila, belaspekta memorigilo.



Anne Jausions

L. L. Zamenhof. *La homo kaj lia idearo en liaj propraj vortoj* de G. C. Figuera

Eldonis: Esperanto-Centro Torino

Nova eseo pri la penso de la kreinto de Esperanto pri religiaj, etnaj, politikaj, etikaj, sociaj kaj esperantistaj demandoj.

40 paĝoj, 39 historiaj piednotoj, bibliografia listo de 115 verkoj pri Zamenhof.

Aparte interesa estas la propono de Zamenhof, en 1914, krei Eŭropan Tribunalon kaj Unuiĝintajn Ŝtatojn de Eŭropo.

€ 3,90. Mendebila ĉe la Libroservo de UEA kaj aliaj libroservoj.





Pro malbona funkciado de (kies?) poŝto, ni fine elektis ricevadi la *Beletran Almanakon* ĉe la adreso de Litova Esperanto-Asocio en Kaŭno. Ni sciis, ke la februara almanako ne aperis ĝustatempe, kaj ĝia apero estis anoncita komence de somero. Dum la septembra unutaga vizito al Kaŭno ĝi ankoraŭ mankis... Ve, ni pensis, la sekva vizito planatas nur por decembro je la Zamenhofa Tago. Tamen, bonŝance ni plu vojaĝis al Poznano por partopreni en la sesio ĉe UAM kaj en ARKONES, kie aperis ankaŭ unu el la almanakaj redaktantoj, István Ertl. Plia bonŝanco, ke li kunhavis ekzempleron, kiun mi povis preni, foliumi, leg(et)i kaj prezenti al vi. Mi esperas, ke antaŭ la Zamenhofa Tago aperos kaj atingos nin la junia almanako por esti prezentita lastafoje en *La Ondo de Esperanto*.

En sia enkonduka prezento Anina Stecay provas klarigi la nesukceson akuratiĝi la aperritmon, kiu rompiĝis en 2018, interalie, per ekspliko de diferenco inter *akurata* kaj *ĝustatempe*. Nu, almanako beletra ne estas tiom strikte ligita kun la jara kalendaro kiom, ekzemple, almanako agrikultura aŭ porinstruista.

La almanakon malfermas nekrologoj, kiuj ne enhavas kutimajn informojn pri la vivo, kariero profesia kaj Esperanta, sed prezentas la forpasintojn el ilia verka kaj/aŭ traduka agado. Aparte atentokapta estas la personeca rakonto de Giulio Cappa pri la kanzonisto Gianfranco Molle (1950-2018). Baldur Ragnarsson estas omaĝita per dediĉaj poemoj de Jorge Camacho kaj kontribuado proza kaj poezia de Miguel Fernández.

Originala prozo ĉeestas per la rakonto *Korespondado* de Mamija Midori kaj daŭrigo de *Lecionoj por viro* de Mikaelo Bronŝtejn. (Kurioze, titoloj de la ĉapitroj jen havas finan punkton, jen – ne.)

Originala poezio prezentiĝas per verkoj de Benoît Philippe, István Ertl kaj Jesper Lykke Jacobsen. Miguel Fernández raportas pri la brila apero de la Ibera Skolo ekster Esperantujo. Temas pri la kontribuo de hispanaj Esperanto-poetoj al la antologio omaĝe al Eugénio de Andrade (unu el la plej universalaj portugalaj poetoj), kie iliaj poemoj aperas en Esperanto kaj la portugalaj traduko. La iberiskolanajn kontribuojn oni povas legi en la almanako. Estas pliaj ekzemploj de la Esperanta kontribuo al la kultura vivo en Hispanio.

La portugalajn poeton mem kaj lian poezion per siaj tradukoj prezentas Miguel Fernández en la tradukpoezia sekcio de la almanako. Ĉi tie oni trovas ankaŭ la

poemon *Por ke konstruiĝu templo nova* de Alokeranjan Dasgupta, kiun el la bengala tradukis Probal Dasgupta.

Prepare al la venontjara Universala kongreso en Montrealo, estas publikigita indiana legendo pri du fratinoj, kiuj por la ceremonio de pliaĝiĝo petas la patron, kiu estas tribestro, inviti la malamikojn. La legendo venas de la libro, kiun kompilis Pauline Johnson, kanada verkistino herede indiana. Ŝi aŭskultis kaj registris legendojn, turneis en Kanado kun deklam-spektakloj, verkis poezion. Kriŝ Smilga (1910-95), latvo, post la Dua Mondmilito migrinta al Kanado, kie li movadumis kaj redaktis la organon de la landa asocio *Lumo*, estas la tradukinto.

Kvar mallongaj rakontoj de Álvaro Cunqueiro el *La aliaj foiranoj* prezentas kvar rolulojn, kiuj estas eksterordinaraj en sia maniero. La tradukinto (el la galega) Suso Moinhos, jene karakretizas: "Temas pri historioj, en kiuj humuro kaj fantazio, kiel ofte okazas en la verkoj de Cunqueiro, montriĝas esencaj por priskribi la vivon de aliaj partoprenantoj de la plej granda foiro: la mondo".

Militrakonto estas esplorprojekto pri la rilato inter Esperanto kaj la Dua Mondmilito. Inter ĝiaj ĉefaj aktivuloj troviĝas Javier Alcalde kaj Pascal Dubourg Glatigny, kiuj intervjuis Carlon Minnaja. La interparolo *Esperantista infaneco en la faŝisma Italio* prezentas al la leganto pripensindajn faktojn pri la ĉiutaga vivo de esperantlingva familio en Romo, pri la tiama Esperanto-movado kaj ĝia rilato kun la faŝisma reĝimo.

Suso Moinhos faris esploron pri la vivo kaj verkoj de Vesna Skaljer-Race, jugoslavia Esperanto-verkistino, kiu, malgraŭ oftaj premioj en Belartaj Konkursoj de UEA, ne estas multe konata. La unuan parton de lia artikolo garnas multaj fotoj.

Tre bedaŭrinda estas la lastatempa ŝrumpo de la recenza fako, pro kiu BA elstaris antaŭe. Ĉu estas nesufiĉa libroproduktado en Esperantujo? Ĉu mankas recenzantoj? Ĉu eldonejoj ne disponigas recenzoekzemplerojn? Do, en la 34a *Boao* Fernando Pita recenzas la romanon de Julian Modest *La viro el la pasinteco*, kaj li aŭguras, ke la verkisto "sufiĉe maturiĝis kaj pretas verki grandan, longspiran romanon...". Psikologian grafikan romanon (tia subtitolo aperas rande de la kovropaĝo), do, komikson, *Cerba fetiĉo* de la polino Kinga Korska prikonsideras Jorge Camacho el la lingva, grafika kaj enhava vidpunktoj. La dulingvan lorenan fabelaron de Benoît Phillippe (kun ilustraĵoj de Pavel Rak) recenzas Anina Stecay.

La kovropaĝo de la almanako prezentas brikmuron kun kontraŭfaŝisma afiŝo, kaj eĉ la listoj de la kontribuintoj kaj redaktintoj aspektas afiŝece. Sed ĉagrenis min la preskvalito de la fotoj, kiuj aspektas iel malpure grizaj; ĉu kulpas la presejo?

Halina Gorecka

Ĝi estas demonstra versio de la 69-paĝa oktobra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko



Ekde decembro 2002 en ĉiu (krom malmultaj esceptoj) *Ondo* aperas “Spritaj splitoj kaj preskeraroj” de István Ertl. Antaŭ 17 jaroj en lia unua kolekto kun la titolo *La fina venko* aperis jena plukitaĵo: «La angla lingvo estas uzata en preskaŭ 80% el la hejmpaĝoj en Interreto. Tamen, malpli ol unu persono en la mondo parolas la anglan», ĉerpita el *Rio Esperantista* (aprilo-junio 1999). Ĉu la situacio ŝanĝiĝis?

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Mankas nur la enhavo

Tiu ĉi librotitolo estas ankaŭ eldonita en la angla, germana, franca, ĉeĥa kaj itala lingvo. (Josef Zzulka: *Bytí – Ekzisto. Filozofio de la vivo*. Praha: Tomáš Pfeiffer; Dimenze 2+2, 2019, prezentopaĝo)

Senlandaj mecenatoj

Oficiala Informilo... Fondaĵo Canuto... Nedelando: R. Koot 100,00; K. Kováts 20,00. (*Esperanto*, 2019, №10, p. 215)

Koran brankon!

Trutkore mi antaŭdankas al vi ĉiuj! (Julia Sigmond: Cirkulero "2019 septembra letero")

Klaĉkiala unikaĵo

... la Esperanta poeto havas je sia dipono lingvon, kies vortfaradaj (ja strukturaj) kapabloj probable estas unike dinamikaj inter lingvoj... (Baldur Ragnarsson: *La lingvo serena*. Pisa: Edistudio, 2007, p. 57; trovis Russ Williams)

Ekspluato ekstrem-Eŭrope

... eluzi la latentajn kaj nekostajn kapablojn de homoj el la centra kaj orienta Eŭropo. (Stefan MacGill: *Regionaj Komisionoj – niaj pordoj al la landa agado // Esperanto*, 2019, №10, p. 196)

Ne tuĵtuĵe revenis tutujen

Kiel konate judoj ekzistis dum 2000 jaroj sen partujo (Zlatko Tišljar: komento al Hanso Becklin: *Preskaŭ mia frato – responde al Joop Kieft*, 9 sep 2019, <https://www.liberafolio.org/2019/09/09/preskau-mia-frato-responde-al-joop-kieft>; rimarkis Kalle Kniivilä)

Ja paco, ne pajaco

Pierre Levy: La paco estas tre prave la ĉefa celo de esperantistoj, kies ĉefa motivo por lerni kaj disvastigi Esperanton, estas la paco. Oni tre bone povas uzi Esperanton ankaŭ por la paco, konsiderante alian celon pli grava por Esperanto. Esperanto estas ĉefe necesa por ĉiu celo, kiun iu esperantisto konsideras ĉefa. (Facebook- grupo "Ĉu vi scias, ke...?", https://www.facebook.com/groups/343432466148323/permalink/652173101940923/?comment_id=652441568580743; liveris Valentin Melnikov)

Ĝi estas demonstra versio de la 69-paĝa oktobra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>